

Agadraporto 2020

1. ADMINISTRADO

1.1. Membraro

2020 : 94
2019 : 156
2018 : 161
2017 : 120

1.2. Jarkunveno

La jarkunveno ne okazis en 2020 pro kronviroza pandemio. La agadan kaj finanĉan raporton aprobis la membroj per reta kaj poŝta voĉdonadoj.

Jen la nova komitato :

- Michèle Abada-Simon (MAS)
- Pierre Gauthier (PG)
- Marc Giraud (MG)
- Didier Janot (DJ)
- Sylviane Lafargue (SL)
- Aurélien Lestage (AL)
- Didier Loison (DJ)
- François Lo Jacomo (FLJ)
- Jean-Lucien Mazeau (JLM)
- Laure Patas d'Illiers (LPI)
- Marianne Pierquin (MP)
- Guillaume Vera-Navas (GVN)

En Junio la komitato elektis la novan estraron :

- Marc Giraud, prezidanto kaj reprezentanto ĉe Esperanto-Francio
- Didier Loison, kasisto
- Pierre Gauthier, vickasisto
- Laure Patas d'Illiers, sekretario
- Aurélien Lestage, vic sekretario

Ĉiuj mandatoj finiĝos dum la jarkunveno 2021.

1.3. Komitataj kunvenoj

Inter la lasta ĜA kaj la venonta ĜA, la komitato kunsidis/os 6foje : 02/06, 04/09, 06/11 (specifa pri strategio), 11/12, 29/01, 19/02.

Ankaŭ okazis informokunsido por ĉiuj membroj : 10/10.

1.4. Rilatoj kun Esperanto Francio

Marc Giraud estas nia delegito ĉe la komitato de Esperanto-Francio. Diversaj bonvolemuloj de nia federacio helpas ĉe la ĉerizejo pri diversaj taskoj. Pluraj franciliaj esperantistoj estas membroj de la komitato de Esperanto-Francio kaj partoprenas en la vivo de la landa asocio

1.5. Komunikado

La komunikado de la federacio unue disvolviĝas per la retejo esperanto.paris. Sekve kaj kaskade, la informoj estas publikigitaj en pluraj sociaj retoj. Por atingi pli rapidan kaj efikan rezulton ni starigis novan organizadon danke al respondeculoj pri diversaj taskoj :

esperanto.paris : DJ, AL
esperanto aktiv' : LPI, MP
Facebook : MP, MG
Dissendo-listoj : LPI, MG
Duolingo : LPI
Amikumu : LPI MG
Twitter : PG
Telegramo : LPI

2. AGADOJ

2.1. Eventoj

En 2020 nia federacio nuligis preskaŭ ĉiujn ĉeestajn eventojn : esperanto-kafejoj, kulturaj vesperoj, koruso, jarkunsido. Estu certaj ke ekde kiam la sanitara situacio pli malplis renormaliĝos, ni ĝoje revivigos tiujn eventojn !

Tamen okazis tiuj ĉeestaj eventoj :

- Eo kafejoj : 11/01 (Café des phares), 08/02 (Café "Chez Margot"), 12/09 (Café de l'industrie)
- Piknikoj : 11/07 (Buttes Chaumont), 08/08 (Bois de Vincennes)
- Prelegoj : 15/01 (Suzanne Roy), 22/01 (Ilona Koutny)

Ni organizis aŭ partoprenis en multaj retaj eventoj :

- foiro pri matematikaj ludoj : filmeto 8'37"-longa, afiŝita en la oficiala retejo, kaj kvar duhoraj retaj akceptoj (28 - 31 majo), kun malpli da vizitantoj ol se estus ĉeesta foiro, sed pli longdaŭraj vizitoj.
- babilrondoj organizitaj kun nia ĝemela urbo Romo

Parizo kaj Romo ĝemeliĝis en 1956, esperantistoj de ambaŭ urboj decidis vigligi kaj fortigi tiun specialan rilaton. Ĝis nun tiu rilato vivas nur per interreto, sed kiam eblos ni planos vojaĝon al tiu belega urbo ! Kadre de la ĝemeliĝo inter Parizo kaj Romo, ni jam organizis 6 babilrondojn pri diversaj temoj. La 7a okazos komence de Februaro kaj temos pri literaturo. Pluraj romaj kaj parizaj membroj interŝanĝas mesaĝon kadre de nia nova koresponda servo. Aliaj retaj projektoj aperos ĉi-jare.

2.2. Instruado

En 2020 nia federacio ofertis 4 kursojn :

- ĉeesta kurso por komencantoj de MAS (neniu aliĝo)
- ĉeesta kurso por mezniveluloj de MAS (nuligita)
- reta kurso por mezniveluloj de MG (7 homoj)
- reta kaj laŭeble ĉeesta kurso de FLJ (3 ĝis 5 homoj)